

La 22an de decembro 2013

Mia vojaĝo al Taroo, Jamada, Oocuĉi kaj Tooni

Ekde junio 2011 mi aniĝas al la grupo, kiu helpas 130 gelernantojn en la urbeto Tooni en la gubernio Iŭate. Ĉiun decembron la grupo organizas harpan koncerton « Sankta Lucia » la 13an de decembro laŭ la tradicio de Luteranismo kune kun la elementa kaj meza lernejoj de Tooni. En nia grupo estas usona misiistino kaj harp-ludantino devenanta de Svedio. Suferantoj de la cunamo bezonas ne nur monon, sed ankaŭ koran trankvilon. En la bela harpa melodio ni konsolas vunditan koron de la lernantoj, kovrante iliajn ŝultrojn per ŝaloj senditaj de usonaj kaj japanaj kredantoj.

Ankaŭ en tiu ĉi decembro la grupo organizis la koncerton, do profitante tiun okazon, mi kaj aliaj 12 esperantistoj vojaĝis al la marbordaj urboj de Iŭate. Komence, la 11an kaj la 12an de decembro, ni vizitis la urbojn Taroo, Jamada kaj Oocuĉi, kiuj estis tute detruitaj de la cunamo, kaj en la lasta tago, la 13an, ni atingis la urbeton Tooni por partopreni en la koncerto en la lernejo.

Atinginte la lernejon, ni kuniĝis kun aliaj partoprenantoj kaj kune vizitis ĉiujn 9 klasojn. Ni vidis la lernantojn lerni, babilis kun ili kaj fotis kune. Ĉiuj estis tre feliĉaj, trovinte, ke la lernantoj fartas tre bone kaj lernas diligente. S-ino Takadate Ĉieko, iniciatintino de tiu projekto, estis precipe ĝoja, kaj kun feliĉega mieno alparoladis al la lernantojn kaj fotadis ilin.



S-ino Takadate estas inter la lernantoj. Malantaŭe estas subtenantoj el diversaj lokoj en Japanio. Ĉiuj ridas en feliĉo.

Hodiaŭ unue mi tradukos eseon de s-ino Takadate Ĉieko, kaj poste mi skribos pri la spertojn, kiujn ni havis dum nia vojaĝo tra la Pacifika Marbordo de la regiono Toohoku.

« Fonduso de Tooni » progresis dank' al multaj subtenoj

Takadate Ĉieko, eksa instruistino en Iŭate

En 2011 komenciĝis projekto subteni lernantojn en Tooni

En aprilo 2011 mi fondis unu-jaran projekton por finance helpi lernantojn en Tooni. Tiutempe mi opiniis, ke post unu jaro de subteno la damaĝitaj urboj restariĝos, sed tio estis tro optimisma antaŭvido. La cunamo damaĝis tre severe kaj tre vaste en la marborda regiono de Toohoku. Ĉiun fojon, kiam mi vizitis tiujn urbojn kaj vilaĝojn, mi devis kritiki min, demandante min, ĉu mia helpo vere helpas tiujn suferantojn.

Fine de la jaro 2011, venis jena mesaĝo de s-ro Hori Jasuo : « Suferoj ankoraŭ daŭras. Ĉu ni povos fini nian helpon nun? Male, certe intereso pri tiuj suferantoj malpliĝos, do des pli necesa estos nia helpo. Ni helpadu la lernantojn plu! » Mi estis konvinkita de tiu voĉo kaj decidis daŭrigi la helpon, kaj tiamaniere ni helpis la lernantojn en 2012 kaj en 2013.

Daŭras malfaciloj de la suferantoj

La 9an de marto 2013 mi vizitis la urbon Jokohamo por partopreni en la subĉiela koncerto de « Kanto de Rekvieto » en la parko Jamaŝita en la haveno Jokohamo. Mi estis tre dankema al la gelernantaj korusanoj de Jokohamo kaj anoj de Jokohamo-Esperanto-Rondo, kiuj kantis tiun kanton temantan pri viktimoj de la cunamo.

Tamen kiom granda estis diferenco inter Jokohamo kaj Iŭate! En Jokohamo nenie estis spuroj de la Katastrofo. La haveno estis plenplena de turistoj, homoj ĝuis promeni kun gaja mieno kaj ĉie estis prospero. Por mi, vizitanto el Iŭate, Jokohamo ŝajnis kiel alia mondo.

En Iŭate, ĉiun tagon oni elsendas en televido kaj ĵurnaloj plurajn programerojn kaj artikolojn temantajn pri la katastrofo. Lastatempe ni foje vidas ja bonajn novaĵojn pri rekomenciĝo de fiŝkaptado kaj restariĝo de damaĝitaj hoteloj kaj kompanioj, sed tion povas ĝui nur malmultaj kompanioj. Plejmultaj povas fari nenion pro manko de mono, kaj suferantoj povas fari nenion, krom sidi en en malgranda provizora domo.

Antaŭ ne longe la registaro decidis buĝeton por helpi la suferantajn urbojn. Ekzemple, en la urbo Oocuĉi, oni dividis la urbon en du partojn : loĝebla distrikto kaj ne-loĝebla distrikto. En la loĝebla distrikto oni donis monon por altigi la ternivelon je 4 metroj kaj post 3 jaroj de ekzamenado la eksaj loĝantoj rajtos reveni al sia tereno. Tamen ili devos atendi minimume 4 jarojn por tio, loĝante en provizora domo kun multaj malfaciloj. La tereno en ne-loĝebla distrikto, sur kiu aliaj loĝantoj antaŭe loĝis, malmultekostiĝis, kaj kontraste la tereno, kiun ili volas aĉeti, multekostiĝis. Multaj homoj perdis sian tutan proprietaĵon, tial multe da ili devos rezigni aĉeti novan terenon por konstrui domon, kaj iuj devos forlasi sian karan hejmon kaj vagadi eksteren.

Aŭdante kaj legante tiujn malĝojajn novaĵojn, mi opiniis, ke ni devas daŭre helpi la lernantojn, sed ĝis kiam?



3. Decido por helpi ĝis 2020

La 30an de aprilo 2013 venis poŝtkarto de s-ino Ito Fumiko, unu el la subtenantoj. Ĝis tiam mi estis ĉiam maltrankvila, obsedate de la demando « Ĝis kiam mi povos aŭ devos helpi la lernantojn ? » Sed tiu poŝtkarto savis min, forviŝinte ĉiun maltrankvilon el mia koro. Leginte ŝian karton, mi trovis, ke mi ne estas sola. S-ino Ito skribis jene : « Mi ĉiam pensas pri lernantoj de Tooni. Tiuj, kiuj eniris en la elementan lernejon de Tooni en 2011, baldaŭ estos en la tria lernoĵaro. Mi volas vivi sane ĝis ili finos la kurson de la mezlernejo ».

Kiel bonkoraj kaj amplenaj estas tiuj vortoj ! Mi estis tiel emociita, ke larmoj falis el miaj okuloj. Ŝia mesaĝo estis tre mallonga, sed tre natura ! Tamen ĝi estis plena de forta volo ! Kiel mi estis savita ! La 30a de aprilo 2013 fariĝis mia memortago por decidi daŭrigi nian helpon ĝis la jaro 2020 al la lernantoj.

La Foduso de Tooni estas subtenata de tiuj, kiuj elkore volas helpi geknabojn, esperoj por la estonteco kaj motoroj por restariĝo de perditaj hejmlokoj. La nombro de la konstantaj subtenantoj estas en efektiveco nur

ĉirkaŭ 30, sed la entuta nombro de subtenantoj fariĝis 311 ĝis la fino de tiu ĉi decembro. Ni estas malmultaj, sed nia decido estas firma. Ĝis la 11a de marto 2011 ni estis tute fremdaj kaj neniam renkontiĝis, sed aniĝinte en tiu ĉi grupo, ni fariĝis samideaj subtenantoj al la lernantoj en Tooni kaj havas okazon kune viziti la urbeton minimume unu fojon jare.

La Japana Katastrofo demandadas al ni, kiel ni devas vivi kaj kio estas vera vivo ?

1. Ĉu vi povas elkore kompati la suferantojn kaj kunlabori por konstrui harmonian socion?

2. Kion vi povas fari kiel membro de nia socio ?

3. Kiun agon vi povas fari al aliaj homoj ?

Je la okazo de la katastrofo mi ĵuris al mi, ke mi fariĝos simpla homo vivanta kun vero. Tio estas gvidilo por mia vivo kaj montrilo por mia vojo. Mi nur volas, ke pli multe da homoj kolektiĝu al la Fonduso de Tooni nur por tio, ke mi sendu plej multe da mono al la lernantoj kaj malpezigu ŝuldojn de la gepatroj.

Ekzistas pli valoraj aĵoj ol mono. Ili naskiĝas kaj kreskas inter tiuj, kiuj amas infanojn kaj gelernantojn, en hejmo, en lernejo kaj en la socio. Por subteni tiujn, mi volas daŭrigi la Fonduson plej longe.

Mia plej granda ĝojo estas renkontiĝo kun la lernantoj en Tooni. Sama ĝojo certe naskiĝas ĉie en la koro de multaj helpantoj en la damaĝitaj regionoj. Mi devas danki, ĉar ankaŭ mi apartenas al tiu amplena homgrupo.

En marto 2020 en la kursfina ceremonio de la mezlernejo Tooni mi deklaras la finon de nia helpagado. Ĝis tiam vi, karaj subtenantoj, paŝu kun mi. (Fino)

Mi aldonas tri aferojn :

1. En Francio multaj esperantistoj mondonacis al mi post miaj prelegoj en 2011, 2012 kaj 2013. Mi elkore dankas al ĉiuj karaj amikoj.

2. Dum la 100a Japana Esperanto-Kongreso en oktobro 2013 multaj partoprenantoj donacis monon al Tooni. La sumo estis multe super nia antaŭsupozo.

3. Mi organizis vojaĝon al Tooni jam kvar fojojn. Ĉiun fojon esperantistoj partoprenis. En ĉi-foja vojaĝo entute 13 esperantistoj partoprenis. Mi konstatis dum la pasintaj tri jaroj, ke esperantistoj apartenas al la plej nobla homa grupo, kaj tion mi fieras.

Kion mi vidis dum mia vojaĝo




Bruligita pinarbo

Japanio estas fama pro *bonsai*. Japanoj tre ŝatas ornami sian malgrandan korton per arboj kaj rokoj simile al *bonsai*. En la urbo Jamada, mi vidis nigran pinarbon sen malgrandaj branĉoj en iu sendoma tereno. Certe ĝi estis la ĉefrolanto en tiu ĝardeno. Jamada estis unue atakita de la cunamo, kaj poste de granda fajro. Pro tio plejparto de la domoj kaj la ĝardenoj en la urbo malaperis, kaj restis nur tiu nigrigita arbo.

Ankaŭ mi volus esti « pinarbo de espero »,
Sed tio ne eblas, ĉar mi jam mortis.
Do konservu min kiel atestanton de la katastrofo.
Kiam vi aŭskultos mian krion,
vi scios, kiel granda estis niaj suferoj.

Detruita tombejo



Ni vizitis tombejon en la urbo Oocuçi. La templo malaperis kaj anstataŭe tie staris malgranda provizora konstruaĵo. Ene estis malgranda statuo de Budho.

Triono de la tombeja tereno estis atakita de la cunamo kaj multaj tomboŝtonoj estis falintaj. Ĉu vi rimarkis malgrandajn, blankajn rondojn sur la ŝtonoj? Posedantoj de tiuj tomboj mem pentris tiujn per blanka farbo, anoncante, ke ili konsentis forĵeti sian tombon. En tiu urbo multaj homoj mortis, pro kio multaj familioj ne plu povas teni sian tombon. Kiel dolorige estas forĵeti sian tombon! Ankaŭ iliaj prapatroj en la tomboj suferas pro la katastrofo. Ĉu la perdo de sia tombo ne gravas, ĉar ili jam eniris en la paradizon ? Tamen la pejzaĝo estis tre malĝojiga.

Monumento pri la cunamo



En la urbo Tooni jam starigis monumento de tiu ĉi katastrofo. Sur la ŝtonoj estis engravuritaj vortoj de preskaŭ 100 lernantoj de la lernejoj Tooni. Iu lernantino skribis jene :

« Kiam vi estos tiel malĝoja, ke vi ne povos vidi antaŭen, vi ne hezitu vidi flanken. Tie certe troviĝas viaj familianoj kaj amikoj, kiuj estos pretaj por helpi vin ».

Lernantoj estas nia espero. Iliaj vortoj kuraĝigas nin.

HORI JASUO